

BE

ISSN 0006-9477



104-a jaro
N-ro 338
Septembro 2011

La sekreta kaŭzo kaj aliaj rakontoj

Riĉa akiro por la esperanta literaturo

Kovrilo

Sur la kovrilo troviĝas la foto de Machado de Assis (1830 - 1908), tre elstara portugallingva verkisto, aŭtoro de kronikaĵoj, poemoj, romanoj kaj rakontoj, kies verko "La sekreta kaŭzo kaj aliaj rakontoj" aperis en Esperanto, danke al la traduklaboro de Francisco Stefano Wechsler kaj de Paulo Sérgio Viana.



Foto de Machado de Assis

- 03** Ĉefartikolo
- 04** Poemo: J. B. Mello e Souza
- 05** Omaĝo: Elvira Fontes
- 06** Opinio: Benedicto Silva
- 08** Eventoj: Fabiano Henrique
- 10** Intervjuo: Benedicto Silva
- 13** Recenzo: Machado de Assis/Tradukis: Francisco kaj Paulo
- 14** Literaturo: Julia Lopes de Almeida
- 17** Kroniko: BEL-Estraro
- 18** Forpaso

Eldiro

"Ni restu je nia standardo. Se la nokto envolas la teron kaj furiozaj ondoj ŝaŭmas, nia steleto estu signal-fajro al homaro, kiu vojeraras. Numtempe ni devas ekstari por proklami al tuta mondo, ke la internacia lingvo malfermas ne nur homajn buŝojn, sed ankaŭ la homajn korojn."

El artikolo skribita de Lidja Zamenhof

Revunkunlaboraĵoj: La ĉefredaktoro rigardas gravaj la kunlaboraĵojn senditajn de la legantoj. Tamen, pro hommanko, spadmigoj en la revuo, kaj kromaj limigoj, li rezervas al si la rajtojn: **1-e:** Ne sciigi la ricevon; **2-e:** Ne redoni la sendaĵojn; **3-e:** Ne garantii publikigon; **4-e:** Mallongigi tekston tiam, kiam necese; **5-e:** Ĝin reviziigi laŭ ortografia, gramatika kaj terminologia aspektoj. Kiel gramatikan konsultfonton ni rekomendas la verkon "Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko", de Bertilo Wennergren. La signifon de ĉiuj vortoj netroveblaj en "Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto" (2005) oni aparte klarigu per glosaro.

Anonctarifoj: Tabelo pri prezoj (Brazila Esperantisto) Onoj de paĝo (anonco)

● Komercaj markoj reproduktitaj celas nur ilustri kaj apartenas al la posedantoj

tutpaĝa (19x25cm)
4-a kovrilo R\$ 900,00 (kolora)
2-a kaj 3-a kovriloj R\$ 600,00
(nigra-blankaj)

1/2 duonpaĝa (9x24cm)
R\$ 450,00 (kolora)
R\$ 300,00 (nigra-blanka)

1/3 trionpaĝa horizontale
(6x18cm) R\$ 300,00 (kolora)
R\$ 200,00 (nigra-blanka)

1/3 trionpaĝa vertikale
(8x18cm) R\$ 300,00 (kolora)
R\$ 200,00 (nigra-blanka)

1/6 sesonpaĝa (7,8x8,8cm)
R\$ 150,00 (kolora)
R\$ 100,00 (nigra-blanka)

Jen alia numero de Brazila Esperantisto, oficiala organo de Brazila Esperanto-Ligo. Ĝi revenas plivigle kaj kun interesaj skribaĵoj, ekzemple, la raporto pri la Triopa Esperantista Kongreso okazinta en San-Paŭlo, sendube laŭdinda evento. La estraro de BEL profitas la okazon por gratuli la membrojn de la Loka Kongresa Komitato, kiuj multe laboris por fari belegan feston. Dankon, geamikoj el San-Paŭlo!

Aliflanke, ni akompanas la intensan laboron de niaj samideanoj el Taguatinga, kiuj preparas ankaŭ fruktodonan kongreson, nome 47^a Brazila Kongreso de Esperanto. Ni ne dubas, ke la urbo havas kondiĉojn por bone kaj komforte gastigi la kongresanojn. Taguatinga estas la plej granda satelita urbo en Federacia Distrikto. Ĝi estas facile atingebla per aŭto, buso kaj metroo. Krome la kongresejo situas en la urbocentro, proksime de bonkvalitaj hoteloj, restoracioj, superbazaroj kaj metroo-stacio.

La estraro de BEL venis al la konkludo, ke Brazila Esperantisto estas vicnecesita por nia movado. Pro tio, ni klopodas aperigi ĝin kvarfoje jare, malgraŭ la financaj malfacilaĵoj. Valoras mencii, ke la kunlaboro de Benedicto Silva, Floriano Pessoa, Francisco Stefano Wechsler kaj Fabiano Henrique ebligis la aperigon de ĉi tiu numero. Dankon, samideanoj!

Valoras mencii ankaŭ la intervjuon kun Benedicto Silva, tre konata de brazilaj esperantistoj pro lia traduklaboro. Benedicto estas kompetenta, laborema kaj eminenta adepto de nia neŭtrala internacia lingvo. Preskaŭ la tutan vivon, li aktivis por Esperanto. Pere de ĉi tiu numero de BE ni povas ekkoni iom pli lia ĝisnuna laboro.

Alia agema esperantisto estis Eléus Leonardo de Sá, kiu senlace laboris favore al nia lingvo en la suda parto de Bahia, dum kelkaj jardekoj. Li forlasis nin en la 1-a de aprilo 2011. Vidu informojn pri Eléus en la rubriko "Forpaso".

Por fini ĉi tiun tekston, ni klarigas ke nia revuo bezonas artikolojn pri diversaj temoj, ĉefe pri la stato kaj estonteco de nia movado. Bonvolu, sendi vian kontribuon, sed ni esperas, ke ĝi estu konforma al la etikaj principoj de esperantismo.

Bonan legadon!



Brazila Esperantisto

ISSN 0006-9477

Oficiala Organo de Brazila Esperanto-Ligo

Fondita en 1907 de Alberto A. Vieira, Reynaldo Geyer kaj Everardo Backheuser
104-a jaro - Junio 2011 - N-ro 337

Eldona Stabo

Respondeca ĵurnalisto: Viviane Castro

Ĉefredaktisto: Eurípedes Alves Barbosa

Ĉi-numeraj kunlaborantoj: Benedicto Silva, Francisco Stefano Wechsler, Paulo Sérgio Vianna

Grafika aranĝo kaj enpaĝigo: Viviane Castro

Revizio kaj tradukado: Eldona Komisiono

Presejo: Gráfica Sergipe (Brasilía/DF)

Kontribuojn kaj mesaĝojn sendu al la retadreso de la ĉefredaktisto: euripedes-barbosa@ig.com.br

Pri la subskribitaj artikoloj respondecas la aŭtoroj mem



Brazila Esperanto-Ligo

Fondita en 1907

Sidejo SDS - Bloco P.36 - salas 301/303 - Ed. Venâncio III CEP 70393-902 - Brasília/DF

Telefono (0xx61) 3226 1298 Fakso (0xx61) 3226 4446

Retadreso bel@esperanto.org.br Hejmpaĝo www.esperanto.org.br

Estraro

Prezidanto S-ro Lício de Almeida Castro Vic-prezidanto S-ro Eurípedes Alves Barbosa
1-a Sekretario S-rino Sufia Alves de Lima 2-a Sekretario S-ro Carlos Alfredo Aragón Guerreiro
3-a Sekretario S-ro Devanizio Apolinário dos Santos
Financa Direktoro vaka Kasisto S-ro Darci Gomes Sardinha

Kontrolo Konsilantaro

Aymoré Vaz Pinto, José Carlos Dorini Ramos, Adolpho de Miranda Silva, Lia Millhomem Moreno,

Cleto Galvão da Silva, Evandro Ferreira de Avellar

Federacia Konsilantaro

Prezidanto S-ro José Roberto Tenório da Silva

Komitatano-A Paulo Nascentes

Ĉefdelegito de UEA James Rezende Piton

La Universala Frateco

J. B. Mello e Souza

Poezio kiu ricevis la I-an premion en la literatura konkurso de la Sesa Internacia Kongreso de Esperanto, Washington, 1910.

B
R
A
Z
I
L
E
S
P
O
R
T
A
N
T
I
S
T
O
4
N
O
3
3
7
J
U
N
2
0
1
1

Sur ondegjoj malpacemaj
De profunda, nigra mar',
En ŝipet' iras sentime
Plej kuraĝa maristar'.
Estas tero malproksima,
Ocean' montriĝas nur;
Sur akvaro la senlima
Ne briletas ja lumtur'.

Kaj la nokt' estas malhela,
Sed ŝipet' antaŭen iras
Sub la ĉiel', arkaĵ senstela...

"kien iras vi, ŝipistoj,
Sur dezerta l'ocean' ?
Ĉu la morto vi ne timas
Pro koler' de l'uragan' ?
kien vi iras vi, bravuloj,
Kion, fratoj, celas vi ?
Nur riferoj, ne insuloj
Ja troviĝas tie ĉi."

Kaj de l' vento forpuŝata
La ŝipet' antaŭen iras
Sur akvaro la malglata.

"Niajn hejmojn forlasinte
Ni foriris el Patruj'
Al haveno ni vojaĝas;
Ĝi aperos, certe, tuj...
Ke ĉiel' bela fariĝos,
Kaj ne estos plu danger',
Ke la maro trankviliĝos
Nin certigas la esper'."

Ventoj ĉesas. En ĉielo,
Inter nuboj, tremetante,
Ekbriletas luma stelo...

Al ŝipistoj nun similaj
Ni laboras kun fervor'
Ĉiujn barojn ni faligos
Nur kun amo en la kor'
La espero nin protektas,

Dum vojaĝo regas ĝoj'
Verda Stelo nin direktas
Tra la tuta longa voj' !

Al laboro, kolegaro!
Ni daŭrigu, kuncelante
La Fratecon de l' Homaro.

J.B. MELLO E SOUZA,

poeto, romanisto, aŭtoro de porinfanaj libroj, postlasis vastan verkaron. Li estis sindona kaj agema esperantisto, kaj forpasis en Rio de Janeiro la 27-an de aŭgusto 1969, en la aĝo 81-jara.

Eminentaj virinoj en la Brazila Esperanto Movado

Elvira Fontes



La instruistino Elvira Fontes naskiĝis en Bauru-SP la 21-an de julio 1916 kaj forpasis en San-Paŭlo la 25-an de aŭgusto 2007. Ŝi esperantistiĝis en 1960, kiam ŝi lernis la lingvon en la "Municipa Kurso", kaj de tiam laboris ĉiutage por Esperanto. Laŭ Gilbert R. Ledon, en la verko Analoj de EASP, Elvira laboris kiel formiko, ĉie, senĉese kaj efike. "Elvira estis la membro, kiu plej laboris por nia asocio kaj tio devas esti registrita en tiuj analoj", aldonis Ledon.

Unue ŝi estis kasisto de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo (EASP), dum la periodo 1970-1971. Dum la periodo 1972-1973, ŝi okupis la postenon de dua sekretario. Elvira brile estis ankaŭ prezidantino de EASP, de 1974 ĝis 1983, kaj redaktis la revuon La Lampiro, oficiala organo de EASP.

Ŝi fariĝis respondeca pri instruado, kursoj, ekzamenoj ne nur en San - Paŭlo, sed ankaŭ en ĉiuj naciaj brazilaj kongresoj. Ŝi estis membro de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kaj ties reprezentanto, de 1975 ĝis 2002. Elvira estis profesie instruisto de franca lingvo. Ŝi dorlote estis nomita "Elvirinha", neniam edziniĝis kaj ne havis infanojn.

Ŝi redaktis kaj reviziis la revueton Milde, de ILEI, dum kvar jaroj. Nia kara samideanino krom verkis kaj eldonis du lernolibrojn: Unuaj Paŝoj kaj Survoje al Esperantujo.

Elvira Fontes estis membro de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj faka delegito de tiu institucio pri literaturo. Ŝi ankoraŭ estis honora membro de UEA, BEL kaj EASP.

En La Lampiro, n-ro 119, 2007, José Martins Coelho skribis, ke Elvira estis maldika, malalta, sed plena de talento kaj energio. José Roberto Tenório esprimis siavice, ke ŝi krom sinonimo de bonkoreco kaj simpatio estis sinonimo ankaŭ de klereco kaj pacienco. En la sama numero de tiu revuo, troviĝas ankaŭ la opinio de James Rezende Piton, jene: "Tuj impresis al mi tiu respektinda sinjorino, fizike simile al miaj praonkloj, kiu preskaŭ ĉiun frazon, eĉ admonon kaj rekomendojn, prononcis kun rideto... Nur iom post iom mi malkovris, ke tiu malgrandulino fakte reprezentis giganton en la moderna historio de Esperanto en Brazilo."

Sendube la nomo de Elvira Fontes enradikiĝis en la koroj de brazilaj esperantistoj.

Kopenhago revekis mian amon al la skandinava beletro...

Benedicto Silva

Enkonduko

Oni povas aserti, ke la unuaj jardekoj de la 20-a jarcento donis al la brazilaj infanoj kaj adoleskantoj la eblon sperti romantikajn etosojn, ĉefe pere de la tiutempa literaturo. Tiam la animo de la tuta junularo estis kvazaŭ lulata de amaso da verkoj riĉaj je buntaj ilustraĵoj kaj je ne nur edifa, sed ankaŭ amuza enhavo.

Eĉ la legolibroj tiam uzataj en elementaj kaj duagrada lernejoj estis ne nur belaspektaj, sed prezentis ankaŭ tre varian enhavon, ĉu prozan, ĉu versan.

Flanke de tekstoj de portugalaj aŭtoroj, ĉefe romantikaj (Almeida Garret, Castilho, Guerra Junqueiro k.a.) kaj brazilaj (José de Alencar, Macedo, Castro Alves, Gonçalves Dias k.a.), legindaj fragmentoj de francaj verkistoj (Victor Hugo, Daudet, La Fontaine k.a.), italaj (E. de Amicis, Collodi [Pinokjo!] k.a.), britaj (Dickens k.a.), germanaj (ĉefe la Fratoj Grimm!) kaj multaj aliaj, estis ofte legataj de la brazilaj junularoj, ĝenerale, kaj, aparte, de studentoj.

Multaj junuloj amuziĝis per la legado de *La Aventuroj de Barono Münchhausen* de Rudolf Erich Raspe!

Mi emfazu ĉi tie, ke nia tiama juna generacio estis tre feliĉa, precipe pro tio, ke por ili estis facile haveblaj verkoj de la plej gravaj literaturoj de la mondo...

Neforgeseblaj estas la vesperoj, kiam nia grupo de junuloj kutime kuniĝis en la lumo

de la publikaj lampoj por legi amason da tiamaĵaj revuoj kaj gazetoj.

Mia spirita kosmopolitiĝo kaj ĝiaj sekvoj

Feliĉe, mi eklernis Esperanton en 1945, en la aĝo de 18 jaroj, precize la 14-an de julio de tiu jaro. Por mi, la ekposedo de la lingvo internacia signifis la malfermon de larĝa vojo al mia ne nur kultura, sed ankaŭ sentimentala kosmopolitiĝo. Tion mi eksentis, kiam mi ekrlatis kun homoj el ĉiuj kulturoj de la vasta mondo, ĉu per korespondado, ĉu per legado de la internacia literaturo.

Tiam, Esperanto ebligis al mi migradi tra la mondo kiel nuntempa vaganta kavaliro. La blankaj librofolioj estis por mi kvazaŭ la ĝusta vojo al magia mondo... Per tiu vojo mi sukcesis atingi ĉefe la literaturojn de la skandinavaj landoj... Kaj per tiuj literaturoj mi povis senti la vivon, la ĝojojn kaj malĝojojn, la aventurojn de la skandinavo.

Tiuj pensoj kaj sentoj ofte ekregis al mi la kapon kaj la koron, dum la tuta semajno, kiun mi pasigis kun mia edzino Maria Stella kaj la juna kaj talenta brazila esperantisto Maurício Signorini Prado de Almeida, partoprenante la ĉijaran UKO-n en Kopenhago.

El la vastaj fenestroj de la impona, kolosa hotelo Bella Sky Comwell, mia rigardo

etendiĝis ĝis fora horizonto, transe de kiu ondis la maro — vasta scenejo de la herooj de *Kalevala*... Tiam mi emocie revidis la prapoeton Väinämöinen; la aervirginon, virgan prapatrinon, belan nimfon de naturo Ilmatar; la junan, magran laponidon Joukahainen kaj lian fratinton, la junan, virgan Aino; la forĝiston Ilmarinen, kiu scias forĝi la Sampon, muelilon de feliĉo; kaj dek, cent aliajn heroojn de tiu monumenta poemo, kiu “elkreskis el la aŭtentika popola poezio kolektita de la plej eminenta folkloro ekskursanto kaj distrikta kuracisto de Kajaani, Elias Lönnrot (1802-1884).”

Se tamen mia rigardo ŝanĝus sian direkton, tiam mi imagus al mi la svedan knabon Nils Holgersson, rajdantan sur viransero, traflugantan la ĉielojn de sia mirinda lando, kun bando da sovaĝaj anseroj...

Ankoraŭ en la svedaj kampoj kaj vilaĝoj, en preĝejo kaj neĝaj vojoj, aperis al mi la mistera figuro de Gösta Berling kaj ceteraj personoj, inkluzive de la “kavaliroj de Ekeby, kiuj pasigis sian gajan vivon”, ĉiuj majstre kreitaj de Selma Lagerlöf. En miaj oreloj kaj en mia animo kvazaŭ vibradis la muzikaj frazoj de la bela traduko fare de Stellan Engholm...

En la **bela** sagao de Gösta Berling kunrolas plej strangaj, plej interesaj homoj, ĉiuj kun kuriozaj vivproblemoj. Sed en la ĉasado kontraŭ la granda urso sur la monto Gurlita la realo miksiĝas kun popolaj, mistikaj kredoj: “*Ĉu io povas doni al besto pli da nimbo de teruro ol tio, ke ĝi estas mortigebla nur per arĝenta kuglo? Kiuj misteraj, teruraj fortoj loĝas en ĝi kaj hardas ĝin kontraŭ ordinara plumbo?* Jen demando pri la ekesterordinara, mistera urso sur la monto Gurlita...

Ankaŭ Astrid Lindgren reaperis en mia memoro kune kun la aventuroj kaj petolaĵoj de *Pipi Ŝtrumpolonga*, *Emilo de Smolando* kaj La Fratoj Leonkoro, ĉi tiuj du lastaj en la majstraj tradukoj de la karmemora Harold Brown kaj lia edzino, mia korespondamikino

Kerstin Rohdin.

La blagoj de *Peer Gynt*, mondfama epopeo de la norvega Henrik Ibsen, revenis al miaj oreloj kaj al mia koro, same intense kiel en mia unua legado de tiu poemo...

Poste venis la vico de *Sep Fratoj*, rakonto, laŭ difino de la finna verkisto Aleksis Kivi, en traduko de Ilmari Ekström kaj kun belaj vinjetoj de la artisto Ahto Numminen. Amuzaj petolaĵoj kaj pensigaj aventuroj de sep strangaj kaj tamen simpatiaj fratoj, kiujn la leganto neniam forgesas ĝis sia vivfino...

Se ree paroli pri ilustraĵoj, kelkaj el la supre menciitaj libroj estis ilustritaj de la eminenta gravuristo Gustave Doré. Kompreneble, tiuj ilustraĵoj per si mem fariĝis ia dia frandaĵo por la tutmondaj legantoj, junaj kaj maljunaj, de la menciitaj libroj...

La apogeo de mia reveko tamen okazis ĉe nia vizito al la ĉarma urbo Odense, riĉa je omaĝoj, rememoroj am- kaj danksentoj al sia eminenta filo H. C. Andersen.

Odense estas kvazaŭ ia sankta altaro, antaŭ kiu Svedio kaj la tuta mondo riverence kultuas la memoron de unu el siaj plej amataj verkistoj.

En Odense, la domoj, la stratoj, la komercaj kaj industriaj firmaoj, la ĝardenoj, la arboj kaj buntaj floroj, ĉio, ĉio spiras dankon kaj admiron al sia genia verkisto.

Miaopinie, la plej alta elmonro de eternaj amo kaj danko al H. C. Andersen estas la muzeo kaj apudaj teatro ĉirkaŭita de lageto, kie ofte prezentiĝas ĉefe al infanaj spektantoj fabelojn de Andersen.

Jen kion la riĉa, internacia E-beletro povas inspiri al siaj multnombraj legantoj...

Jen kion mi povis sperti kaj ĝui dum mia mallonga restado en Danio, kiel ano de la ĉijara UKO kaj, plie, kiel amanto de la skandinava kulturo.

Sendube, multaj aliaj kogresanoj spertis la saman senton...

Triopa Esperantista Kongreso en Brazilo

Fabiano Henrique

De la 9-a ĝis la 14-a de julio 2011 tri eventoj samtempe okazis en la urbo São Paulo. Temas pri la 8-a Tutamerika, la 46-a Brazila kaj la 31-a Junulara kongresoj de Esperanto. La aranĝojn organizis respektive la Amerika Komisiono de UEA, Brazila Esperanto-Ligo (BEL) kaj Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO). La kongresejo lokiĝis en la instalaĵoj de Fakultatoj Sankta Marcelina (FASM).

Ne malprave la partoprenintoj nomis la renkontiĝojn *Kongresego 2011*. La programo enhavis ĉirkaŭ 60 erojn, kiuj etendiĝis de la 9-a ĝis la 22-a horo.

Pli ol 450 homoj aliĝis. Krom esperantistoj el preskaŭ ĉiuj brazilaj ŝtatoj, enskribiĝis 54 personoj el 9 Eŭropaj kaj 9 Amerikaj landoj.

Laŭ la plimulto de la partoprenintoj la plej alloga programero estis la Unua Esperantista Kinofestivalo, kies slogano estis *Kino sen Limoj*. Ĝin kunordigis la ruso Aleksander Osincev. La spektantaro amuziĝis per filmoj originale parolataj en Esperanto aŭ kun subtekstoj skribitaj en tiu lingvo.

Du KD-oj estis lanĉitaj kaj okazis kelke da muzikoprezentadoj. Kultura Kooperativo Cooperativo de Esperantistoj organizis prelegon por publikigi la postmortan diskon de la kantistino Vera Jordan, kies titolo estas *Esperanto: mia pasio*. Dirce Salles dancigis la homojn, kiuj ĉeestis la lanĉoprezentadon de la KD *Jen Mi*. La kantisto Tone kantis kaj instruis *capoeira* (brazila milito-arto).

La eldona agado estis fruktodona ĉi-jare. Eldonejo Lorenz publikigis la *Almanakon Lorenz 2011*. La kolombia muzikestro Alfredo Aragón prelegis pri la ĵus aperinta *Muzika Terminaro*. Paulo Sergio Viana kaj Francisco Wechsler kuntradukis kaj eldonis la libron *La sekreta kaŭzo kaj aliaj rakontoj*, kiu enhavas tekstojn de la famkonata brazila verkisto Machado de Assis. Sebastião Pimentel prelegis pri la antaŭ nelonge publikigita libro *Jes, sinjoro! Vikto Vivas*. José Dias Pinto lanĉis *Partikularaĵojn de Blonda Knabino*. Katalin Kováts disvastigis la verkon *Stelsemantoj* en la ora nordo. Legio de Bona Volo (LBV) aranĝis prelegon por diskonigi la libron *Meditadoj el la Animo*, de José de Paiva Neto.

Ekumena etoso regis en la kongresejo. La monaĥinoj, kiuj zorgas pri FASM, permesis, ke la altaro de la kapelo estis respektoplene kovrita per la Esperanto-flago. Tie membroj de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) ĉiumatene kunordigis preĝorondojn. Tiuj samaj fratinoj deklaris, ke ili deziras ekterni la Internacian Lingvon kaj ĝin enkonduki en la kadron de la lernobjektoj de tiu edukejo.

Katolikismo kaj Esperanto estis la temoj de la prelego farita de Vitor Rigotti dos Anjos. Anoj de Oomoto kunvenis. Unuafoje en Brazilo ateistoj renkontiĝis en tiuspecaj eventoj dum aranĝo estigita de Tulio Flores. Luis Jorge Santos Morales, prezidanto de Ko-



EKS-prezidanto José Passini prelegas.



Solena malfermo de la 46-a BKE.



Katolikisma arangaĵo.



La preleganto Osmar da Silva Alves.

lombia Esperanto-Asocio, paroladis pri *La Daŭra Surtera Feliĉo je Ĉies Atingo*.

Spiritismaj esperantistoj festis la 120-a naskiĝjaron de Ismael Gomes Braga. Okazis ankaŭ la tradicia kunveno de amikoj de Eldonejo Lorenz. La lastan tagon Osmar da Silva Alves prelegis pri la vivo de la mediano Chico Xavier.

Radio Rio de Janeiro elsendis rekte el la kongresejo en la 12-a de julio. Fabiano Henrique prelegis kaj omaĝis la radioparoliston Givanildo Costa pro la 25-a jariĝo de la programo *Esperanto, la Lingvo de Frateco*, okazonta la 21-an de novembro.

Speciala kunveno festis la 60-an datrevenon de Kultura Kooperativo Cooperativo de Esperantistoj. La kuban e-movadon pritraktis Alberto Calienes, prezidanto de la Amerika Komisiono de UEA. La instruisto Marcio Santos estigis forumon pri la temo *Kiel marŝas nia disvastigo?* James Piton kunordigis la kunvenon de Delegita Reto de UEA.

La venonta Brazila Kongreso de Esperanto okazos en la urbo Taguatinga, en la ĉirkaŭaĵoj de Braziljo, de la 15-a ĝis la 19-a de januaro 2012.

Benedicto Silva

*Tiun ĉi intervjuon mi dediĉas al mia estimata samideano
D-ro Eurípedes Alves Barbosa*

1 – Kiu estas Benedicto Silva?

Mi naskiĝis en 1927, en la urbo Cravinhos-SP. En mia naskurbo mi vivis ĝis 1948. De Februaro de 1948 ĝis 1951 mi loĝis en Ribeirão Preto-SP. Poste mi sinsekve loĝis en Votuporanga, Americana kaj Monte Aprazível, urboj ankaŭ situantaj en ŝtato San-Paŭlo.

En 1983 mi emeritiĝis kiel instruisto pri latina kaj portugala lingvoj, en ŝtata lernejo de Monte Aprazível, kiam mi povis fariĝi 100% aktiva en nia E-movado. En tiu sama jaro mi transloĝiĝis al São José do Rio Preto, kie mi restas ĝis nun.

10

2 – Kiam kaj kiel vi esperantistiĝis?

En 1945 mi aŭtodidakte eklernis Esperanton. En la komenco de la kvara jardeko de la pasinta jarcento, prof. Oswaldo Arruda Stein, lernejestro de la ĉefa elementa lernejo de mia naskurbo, Grupo Escolar “João Nogueira”, komencis instrui Esperanton tie, kaj fondis la “Couto Fernandes” Esperantan Klubon, kiu bedaŭrinde ne havis longan vivon. Kvankam lia nomo ne plu estas memorata de la nuntempaj brazilaj esperantistoj, prof. Oswaldo Arruda Stein estis klera esperantisto kaj entuziasma disvastiganto de la internacilingvo. Bedaŭrinde, mi ne povis viziti lian kurson, ĉar tiam mi devis labori ĉe la komerca vendejo de mia patro, de mateno ĝis vespero. Tamen, unu el la plej diligentaj lernantoj de tiu kurso, la karmemora prof. Euclides Ferreira, ĉiutage informis min ne nur pri la kurso, sed ankaŭ pri la facila gramatiko, interesa leksiko kaj, resume, la spirita esenco de la lingvo internacia — ĝia interna ideo. Ĝuste la 14-an de Julio de tiu jaro Euclides donacis al mi ekzempleron de *Primeiro Manual de Esperanto*, lernolibro originale eldonita en Franclando kaj portugalgita de prof. Ismael Gomes Braga. Ĝi estis mia unua lernolibro de Esperanto. Samtempe kiam mi entuziasme strebadis al la posedo de Esperanto, mi komencis ne nur legi verkojn de la brazila kaj tutmonda literaturo en la internacia lingvo, sed ankaŭ korespondi kun eksterlandaj esperantistoj.

3 – Rakontu viajn spertojn en la tradukado.

Miaopinie, la traduko estas unu el la plej gravaj funkcioj de Esperanto. Se paroli pri la

grandioza verko de Zamenhof, oni ne povas nei, ke estas ja same gravaj kaj valoraj liaj originalaĵoj kaj liaj tradukaĵoj. Tamen, ĉar Esperanto estas interlingvo, mi pensas, ke ĝia plej grava rolo estas interligi homojn kaj ties kulturojn. Efektive, per sia traduka agado, Zamenhof lasis al ni riĉegan materialon, kiu ĝis nun estas unika modelo de lingvaĵo kaj stilo. Nebezone diri, ke la *Malnova Testamento* okupas gravan lokon en la verkaro de la majstro.

Estis ja per la traduko, ke mi komencis mian, ĝuste dire, beletran karieron. Tio okazis en 1966, kiam prof. Ismael Gomes Braga perletere demandis min, ĉu mi volas traduki iun spiritisman libron. La demando min forte surprizis, ĉefe pro tio, ke mi tiam rigardis prof-on Ismael kiel unu el la plej eminentaj esperantistoj. Li proponis al mi la esperantigon de *O Martirio dos Suicidas* de Almerindo Martins de Castro. Kompreneble, emociite mi akceptis lian honorigan inviton. Poste mi esperantigis la faman romantikisman romanon *Iracema* de José de Alencar, la teatraĵeton *La vulpo kaj la vinberoj* de Guilherme Figueiredo kaj plurajn versaĵojn kaj rakontojn de la brazila literaturo. Intertempe, la Brazila Spiritisma Federacio kaj la japana religia organizaĵo Oomoto komisiis al mi la tradukon de pluraj doktrinaj libroj. En tiu laboro, ĉiam estis neesprimebla la bonvolemo, kun kiu kelkaj eminentaj samideanoj, laŭ mia peto, ne nur korektis, sed ankaŭ poluris kaj igis pli legindaj miajn tradukojn. El tiuj sindonemaj fratamikoj mi ne povas ne registri ĉi tie almenaŭ la jenajn nomojn: Ismael Gomes Braga, Leopoldo Knoedet, Affonso Soares, Allan Kardec Afonso Costa kaj la japano Tazuo Nakamura. Al ili mi estas eterne danka.

Sincere mi diru, ke el la malfacila traduklaboro mi multe lernis kaj eterne lernos...

4- Kiu estis via plej ĝoja momento en la E-movado?

Sincere mi diru, ke efektive la Esperanto-movado donis al mi ne nur unu ĝojan momenton. Ĝi plurfoje ĝojigis mian vivon ekde la momento, kiam mi ekkontaktis kun samideanoj disigitaj tra la tuta mondo.

La Esperanto-movado ankaŭ ĝojigis min, kiam ĝi kredigis al mi, ke la homaro povas esti feliĉa, kondiĉe ke ili forigu el la tera surfaco ĉiaspecajn barojn apartigantajn la homojn, kiel orgojlon, arogantecon, antaŭjuĝon, netoleremon ktp. Se eĉ inter la esperantistoj persistos tiuj teruraj trudherboj, iam la fratamo kaj interkomprenado sukcesos elsarki ilin el ties koroj kaj animoj...



Eurípedes kaj Benedicto.

5- Kion reprezentas Esperanto por via vivo?

Jam de longe Esperanto estas mia vivo. Se de unu flanko mia materia vivo dependas de aero, akvo, sango, nutraĵoj, kuraciloj ktp, de alia flanko mia intelekta kaj spirita vivo dependas precipe de Esperanto.

Mi estas plene konvinkita, ke Esperanto estas por mi la ĉefa pravo de ekzisto, kaj mi konfesas, ke en tiu aserto mi ne troas.

En mia nuna aĝo, mi tute ne scius, nek povus vivi, sen Esperanto, des pli en la du lastaj jaroj, kiam mi komencis uzi ĝin en miaj landaj kaj eksterlandaj kontaktoj ankaŭ per interreto! Cetere, danke al Esperanto kaj interreto, mi sukcesis akceli mian kolekton de tradukoj de *Le Petit Prince* de Exupéry, komencitan en 1973! En la du lastaj jaroj, dank'al Esperanto plus interreto, mia kolekto duobligis!

Esperanto malkaŝis al mi mirindan beletron ekzistantan jam de jarcentoj aŭ jarmiloj, sed enŝloŝitan en dekoj aŭ centoj da lingvoj. En Esperanto trakuras la mondo, en belaj tradukoj, miloj da verkoj, el kiuj ni povas mencii almenaŭ la jenajn: *La Sankta Biblio*, *La Nobla Korano*, *Bhagavad-Gita*, *La Dia Komedio*, *La Floro kaj Vivo Nova* de Dante Alighieri, *Fausto* de Goethe, *Gösta Berling* de Selma Lagerlöf, *Krimo kaj Puno* de Dostojevskij, Kalevala, la monumenta finna epopeo, *La Luzidoj* de Camões, *Peer Gynt* de Ibsen, *Jerusalemo Liberigita* de Torquato Tasso, *Quo Vadis* de Sienkiewicz, *Don Quijote* de Cervantes kaj multajn, tre multajn aliajn elstarajn verkojn de la internacia literaturo. El tiu literaturo mi listigis ĉi tie nur plej etan parton.

Tio donas al mi grandan vivĝojon.

Mi profunde bedaŭras, ke multaj, tre multaj kleraj homoj antaŭjuĝe refutas Esperanton, sen eĉ scivoleme sondi, spioni, gvati ĝian gramatikon, ĝian vortaron, la simplecon de ĝia frazo... Iam, post longa aŭ mallonga tempo, ili malkovros tion, kaj bedaŭros la tempon perditan...

6 – Viaj planoj kaj revoj por la estonto.

En la alta aĝo de 84 jaroj, mi ne povas nek rajtas revii pri estontaj planoj. Tamen... aliflanke, oni ne rajtas perdi la esperon, krucante la brakojn. Unue mi diru, ke mi anticipu jam spertas la estonton. Estonto ĉiam revita de mi. Mi tute ne neglektas ĉefe mian privatan E-bibliotekon. Kiel eble plej ofte, mi avide akiras novajn eldonaĵojn, ĉefe klasikaĵojn. Lastatempe du eminentaj tradukistoj satigas mian spiritan, beletran voremmon: la nederlanda Gerrit Berling kaj la itala Enrico Dondi. Tian saman plezuron mi jam ĝuis antaŭ pluraj jaroj, legante la tradukojn de la sveda Stellan Engholm, de la brazila Porto Carreiro Neto, de la japana Tazuo Nakamura, kaj de pluraj aliaj eminentaj tradukistoj el pluraj landoj...

Mia alta aĝo tute ne pezas al mi, des pli ke en la lasta Julio mi partoprenis kun mia edzino Maria Stella B. Silva kaj la brila esperantisto Maurício Signorini Prado Almeida en la 96-a UKO en Kopenhago...

Super ĉio, Esperanto mirakle reunigas la homojn, tiel ke ili povas... almenaŭ revii plu...

Tio okazas al mi.

La sekreta kaŭzo kaj aliaj rakontoj

Machado de Assis

Tradukis: Francisco Stefano Wechsler kaj Paulo Sergio Viana

Nur homo, kiu jam provis traduki beletran tekston, de unu lingvo en alian, kapablas plene senti la malfacilecon de tia laboro kaj ĝuste taksi la meriton de sukcesa tradukinto. Al tiu konkludo mi unu plian fojon venis, leginte la ĵus lanĉitan volumon "La sekreta kaŭzo kaj aliaj rakontoj", de Machado de Assis, en Esperanta traduko de Francisko Wechsler kaj de Paulo Sérgio Viana.

La lingvo estas klara kaj flua, ŝajnas originale verkita, kaj nepre transdonas la sencon de la originalo. Machado de Assis, kies verkoj famiĝis pro la stilo klasika, subtile ironia, kaj ĉiam eleganta, estas de multaj rigardata kiel la plej bona brazila verkisto, kaj unu el la plej konataj eksterlande. Liaj romanoj, rakontoj, poemoj, kronikoj fariĝis temo de studoj kaj debatoj de multenombraj fakuloj.

En la antaŭparolo al ĉi tiu verko, troviĝas bona, konciza biografia resumo pri Machado, kaj klarigoj pri la traduko. Eble restas angulo ankoraŭ ne sufiĉe ekzamenita, nome tiu de la homa, ĉiutaga familia vivo de Machado de Assis. La bezonon de tia pli intima konatiĝo sentis kaj deklaris Rui Barbosa en la adiaŭa parolado, ĉe la tombo de Machado, kiun li faris, komisiite de la Brazila Akademio de Beletro: "Ĉi-momente mi celas, ne la klasikulon de la lingvo, nek la majstron de la frazo, nek la modelon en beletro, nek ankaŭ la filozofon de la romano, ne la magiiston de la rakonto, nek la juveliston de la verso, inter la samtempuloj senrivala ekzemplo de eleganteco, ĉarmo, atikismo kaj simpleco en la kreado kaj vortigo de la penso. Mi ja celas tiun homon kiu scipovis intense vivi la arton, ne forlasinte bonecon". (brazila juristo, ĵurnalisto, oratoro).

La naŭ rakontoj en ĉi tiu libro estis zorge elektitaj kaj apartenas al diversaj fazoj de la verkado de Machado de Assis, nome romantika, transira kaj realisma. El la du tradukintoj, Paulo Sérgio estas la pli konata de la esperantistoj, pro siaj antaŭaj tradukoj, ĉefe "Dom Casmurro" kaj "Postmortaj rememoroj de Brás Cubas". Francisko Stefano Wechsler, ankaŭ plena reganto de la internacia, de la portugala kaj de aliaj lingvoj, estas krome universitata profesoro, tradukanto de Fernando Pessoa kaj nun eldonisto de libroj. Nepre legenda verko, riĉa akiro por la Esperanta literaturo.

Machado de Assis (1839-1908)

RECENZO DE FLORIANO PESSOA, aŭgusto 2011.

“In extremis”¹

Júlia Lopes de Almeida

Tradukis: Francisco Stefano Wechsler

N.T.: Júlia Lopes de Almeida (1862–1934) verkis multajn romanojn, rakontojn, kronikaĵojn kaj artikolojn, kiuj estis dum ŝia vivo tre popularaj, sed poste preskaŭ tute forgesiĝis. Kvankam ŝi ne samrangas al Machado de Assis (kiu cetere admiris ŝian talenton), tamen ŝia stilo estas eleganta kaj simpla. Ŝi ja sukcesis produkti emociigajn pecojn, kiel la jenan rakonton, ĉerpitan el la kolekto “Eterna angoro”. Rimarku, kiel la frivolan etoson de la komencaj paraĝrafoj, reliefigitan per la uzado de fremdlingvaj vortoj, sekvas densa dramo.



— Ĉu vi jam pretiĝis, Laura²? demandis doktoro Seabra, enirante la toilette-ĉambron de sia edzino.

— Jes... mankas al mi nur la gantoj... Kia vi trovas min?

— Belega!

Li ne mensogis. La edzino aspektis al li eĉ pli bela kaj freŝa, kun sia helblua robo, tre malpeza, kaj la ĉapeleto el fajna punto, gracie aranĝita sur la blonda kaj larĝonda hararo. Ŝi ridetis, ĝoja, surŝprucigante sin per *white rose*⁴; li kuntiris la grizajn brovojn, rimarkinte, sur la delikata haŭto de sia edzino, intiman ekstremon de kontenta vanto.

— Ĉu la veturilo staras ĉe porde? la junulino demandis, per senatenta maniero, observante sin tutan ĉe granda spegulo kaj pudrante

per bulkvasto el *veloutine*⁵, je fina vaporeca tuŝo, sian blankan kaj perfektan kolon.

— Jes, kaj jen la rozbukedo, kiun vi petis.

— Kiel bonkora vi estas!...

— Hodiaŭ la ĉevalkuroj verŝajne estos tre viglaj. La vetero belegas! Ĉu vi kunportos la knabinecon?

— Ne, panjo prizorgos ŝin, mi jam venigis ŝin tien... Jen vidu, hodiaŭ mi havas tiom multe da lakto!... mi timas, ke mi makulos la robon... kia honto, se...

— Aŭskultu, li interrompis; ŝajnas al mi, ke ni devus, antaŭ ol iri al la Derby⁶, resti iomete ĉe Bruno Tavares.

Doktoro Seabra estis eksidinta malantaŭ sia edzino kaj rigardadis ŝin ĉe la spegulo, per okuloj esploraj kaj observaj. Li vidis ŝin ekstremitaj; li paŭzis; ŝi levis la bulkvaston, atendente la finon. Li fine kompletigis:

— Bruno tre malsanas... mi kredas eĉ, ke li ne postvivos!

Laura sin turnis, tre pala, kun duonsvenaj okuloj kaj tremantaj lipoj. La edzo malsuprenrigardis, malĝoja. Jam de longa tempo li sciis, kiom da amo lia edzino dediĉas al Bruno. Lia edza ĵaluzo neniam eksplodis, sed koncentriĝis, ĉiam pli amara, en la fundo de

lia koro. La alia estis juna, li jam proksimiĝadis al maljunaĝo; la alia estis revemulo, idealisto, kiu simpatiis al la arda imagpovo de Laura; li estis scienculo, materiisto, nekredanto, jam sen energio por ĉarmi iun ajn. Li konis, studadis senripoze la menson kaj koron de sia edzino kaj fidis ŝin.

Laura estis honesta, sindediĉa, kaj sufokadis fortanime sian pekan amon, en la faldojn de mantelo de virto kaj sinofero. Li sciis, ke Bruno neniam amdeklarais, sed kion lipoj prisilentis, tion respektoplene esprimis la rigardo, lia varma haŭto, la sono de lia juna voĉo kaj la aŭdaco de lia fantazio de enamiĝinto!

Kiom da fojoj doktoro Seabra, simulante legadon de siaj studlibroj, *aŭskultumis* de malproksime tiujn du korojn, kiuj sin tenadis, unu kontraŭ la alia, mutaj kaj teneraj, dum la buŝoj paroladis pri poezio kaj floroj, lunlumo kaj muziko, birdoj kaj floroj, pri ĉio, kio brilas, ĝojigas, entuziasmigas kaj unuigas enamiĝintajn animojn...

Ili legis kune, rakontis unu al la alia scenojn el infanaĝo, gaje, kun reciproka intereso; kaj doktoro Seabra turnis la sekajn paĝojn de sia libro per tremantaj manoj, kun malsekaj okuloj kaj peza koro. Li timis interveni, mutigis siajn zorgojn, ĉiam esperante solvon aŭ manieron konduki sian Laura alilanden, sen elmontri sian maltrankvilon, pro honto aspekti ridinda aŭ ofendi sian edzinon. Ŝi estis petola, gracia, sed firmkaraktera. Eĉ tiutage li klare komprenis, ke ŝia tuta gracia, ŝia tuta parfumo, ŝia tuta ĝentilo celas la alian, kiun ŝi esperas renkonti ĉe la ĉevalkurejo, sur la benkaroo...

La alian celis la rozbukedo, la delikateco de ŝia fajna punto, la milda koloro de ŝia printempa *toilette*! Al la *alia* flugis ŝia tuta penso, ŝia tuta volo, ŝia tuta ĝojo!

Laura daŭre restis pala, senmova.
 — Tion ĉi diris al mi la kuracisto, la edzo daŭrigis. Ĉar vi estas amikino de la familio, mi ekpensis, ke vi eble dezirus iri tien.

— Jes!... ek!... ek!...

Ili malsupreniris. La tago estis rava, preterpasadis veturiloj plenaj de junulinoj irantaj al la ĉevalkurejo. Ridetis la suno, orumante la spacon, kaj la bruo de festa dimanĉo gajigis la stratojn.

Laura sidiĝis silentega, angore premante per la manoj sian bukedon. La edzo sentis ŝian doloron flui tra la silento kaj senmova rigardado de iu vidanta fantomojn...

Li kompatis ŝin, tiun kompatindan, virtan amantinon, reveman kaj ĉastan. Mankis al li kuraĝo por ĝeni ŝian doloron kaj pensadon per vorto aŭ eĉ gesto.

Tiu unika kompatemo plenigis lin mem per mirego!

Ŝi nun ŝajnis al li iomete kiel filino, kvankam li amegis ŝin kiel virinon! Ŝi estis tiel juna, tiel sensperta, sed tiel karesema, tiel obeema, ke li arogis al si la superan rajton gvidi ŝin karese, kun afabla zorgemo de patro. Li komprenis la karakteran firmecon de la junulino, li sciis, ke ŝi preferus morti ol trompi lin malĝentile, kaj ke ŝia tuta pasio pri Bruno konsistas en fantazio kaj revol!

Kulpas ne ili, sed li, ĉar la haroj jam blankas, la parolo jam malviglas, la menson turmentas diversaj ĉagrenoj.

La morto de tiu junulo estus sensuferigo por lia koro. Je ties forpaso, malaperus la kaŭzo de lia amara kaj neresanigebla ĵaluzo. Laura plu amus la junulon dumlonge per siaj preĝoj, per la steloj; sed tempopaso sukcesus kviete mildigi ŝian resopiron... kaj ĉio finiĝus en dolĉa paco. Se la alia ne mortus... li trenus sian edzinon tre foren, sen ke ŝi suspektu la kialon, tamen li antaŭtimis la batalon kaj ne kredis pri sia venko!

Li supozis, ke la pensoj de ambaŭ unuiĝus porĉiame trans foreco, kuntrenate de la sama idealo, de la sama ardo kaj de la sama espero! Jes, nur la morto, benita morto, kapablus falĉi, per siaj malvarmaj flugiloj, tiun burĝonantan amon...



Kiam la veturilo haltis, Laura eliris sen atendi helpon kaj kuris al la domo de Bruno. Ene regis malgaja silento, tomba etoso...

La patrino de la junulo venis al ili plorante. La filon kuracistoj deklaris nepre mortonta; kaj ŝi priskribis la hororon de la febro, forportanta lin tiel rapide.

— Cetere, li rifuzas ĉian nutraĵon; nur lakton sukcesas engluti... La kuracistoj preskribas al li virinan lakton⁷, mi jam alvokis plurajn nutristinojn... unuj ne volas mamnutri lin, aliaj rifuzas elpumpi la lakton! Kaj mia filo mortas... mia filo mortas!

Laura rigardis al sia edzo; ili restis mutaj, starante frontalfrunte. La dommastrino fine kondukis ilin en la ĉambron de la malsanulo.

La junulo, enterigita inter la faldoj de litotukoj, ŝajnus dormanta, se li ne movus kontinue siajn tre sekajn lipojn. Eliĝis el lia tuta korpo febra varmego. Lia pli aĝa fratino gardadis lin zorgeme, sidante apud la lito.

— Ĉu jam venis la nutristino, panjo? ŝi demandis per plorplena voĉo.

— Ankoraŭ ne!

Bruno ne malfermis la okulojn, sed eta kuntiro sulkgigis liajn vangojn. Doktoro Seabra ekstremis. Ĝi ŝajnis al li la morto! Laura denove sin turnis al la edzo, kun afliktata mieno kaj demanda rigardo.

Li ŝanceliĝis momenton; poste li gestis al ŝi jese, tre malklare, preskaŭ nerimarkeble! La junulino genuis rapide kaj malbutonis per nervozaj kaj palpantaj fingroj sian belegan helbluan robon. La edzo sin klinis, tremanta, kun vastigitaj naztruoj kaj premata koro; pentante pri sia konsento, li eble emis diri

ne! — sed Laura jam eltiris sian ŝvelintan, blankan mamon, kies vejnoj etendiĝis per mallarĝaj, bluecaj fadenoj, kaj ŝi ektuŝis per la rozkolora pinto la ardan kaj sekan buŝon de la mortanto.

Ŝi, tre klinita antaŭen, duonkovris la bruston de la malsanulo, li ensuĉadis la lakton per grandaj englutoj, avidege, malfermante iom post iom siajn okulojn.

La emocio de Laura estis grandega! Savi sian amaton, sian revatan amanton, sian esperon, per lakto el sia karno, sango el sia vivo, estis por ŝi plezuro kun neestingebla dolĉeco! Ne volupto, ne sensa pasio vibradis en ŝia malfortika korpo de juna virino, sed ia kompatato, ia tenero, kiu inundis ŝian animon tiamaniere, ke ĝi igis ŝin ami nun la junulon, same kiel patrino amegas fileton...

Li plene malfermis la okulojn: li rekonis ŝin... estiĝis reciproka rideto, ekflagro de vero! Sed la febro postulis pli da lakto, kaj li plu suĉadis la karnon de la virino, kiun li eĉ songe ne profanis, dirante per la okuloj ĉion, kion li ĉiam mutigis — ke li amas ŝin... li amas ŝin... ĝis la malviglo refermis liajn palpebrojn, kaj li endormiĝis profunde, sen kuntiroj, kun paca rideto sur la kontentaj lipoj... Laura enrobis la mamon, tremanta kaj feliĉa...

Nur doktoro Seabra ekkomprenis, ke la dormado de la junulo estas la lasta, kaj kun kompatato kaj emocio li vidis Laura stariĝi kaj diri, plene sin fordoninte al li, ĵetante sin en liajn brakojn, kun esprimo de venko kaj sincero:

— Dankon, kara mia... kiel bonkora vi estas!

1-N.T.: [in ekstremis]. Latine: *je la lasta momento*.

2-N.T.: [*laŭra*].

3-N.T.: [*tŭalet*]. France: *tualetto*.

4-N.T.: [ŭajt roŭz]. Angle: *blanka rozo*. Speco de parfumo, lanĉita en 1800 kaj ankoraŭ nuntempe vendata.

5-N.T.: [*velutin*]. France: *felpo*.

6-N.T.: Temas pri la tiama Derby Club [*dabi klab*] (angle: *Ĉevalvetkura Klubo*), en Rio. La klubo fondiĝis en 1850 kaj ties ŭevalkurejo pretiŭis en 1868. Ĝi dekadencis dum la 20-a jarcento, kaj ĝin anstataŭas nuntempe du stadioj kaj Universitato de Stato Rio.

7-N.T.: Al virina lakto oni tiam atribuis resanigan proprecon.

Brazila Kroniko

BEL-Estraro

Kio okazas en via Regiono

NITEK



Ekde la 11-a de Aŭgŭsto, funkcias en la sidejo de **Niteroi E-Klubo** (Niteroi, Brazilo) Baza Kurso de Esperanto, sub la gvido de Aloisio Sartorato.


La lecionoj okazas ĉiuŝaŭde, de la 5-a ĝis la 6:30 p.t. kaj la kurso finiĝos la 15-an de Decembro.

Facila Vento portas vin al Esperanto



Nun estas nova ebleco por uzi esperanton. Facila Vento proponas liveri senpage al la komencantoj facilajn tekstojn adaptitajn de aliaj fontoj. La periodeco de ĉi tiu e-revuo estas semajne, eĉ se kun malgranda enhavo. Krom la tekstoj, la revuo portos informojn pri novaj muzikoj, filmetoj, novaĵoj. La ĉefa celo de la projekto estas instigi la legantojn uzi la lingvon kun legantoj de malsamaj landoj per la rimedoj en la propra paĝo. La adreso de Facila Vento estas <http://facila.org>.

Brazilaj Lernolibroj nun en Francujo



Oni devas ankoraŭ multe gratuli a Josias Barboza pro la granda laboro sia. En la paĝaro de edukado.net estas la propra Josias, kiu raportis pri novaĵo, kaj plifoje ĝojigis la mondan esperantistaron.

Titolita “**Francujo importas de Brazilo lernolibrojn de Esperanto**” la raporto nin informas:

“Komence de septembro 2011, Unuiĝo Franca por Esperanto importis de Brazilo 45 ekzemplerojn de la lernolibro **Esperanto por Lernejoj Klasoj**, de Josias Barboza. La lernopakaĵo konsistas el volumoj 1 kaj 2 de la lernanto kun son-lumdiskoj kaj la kernaj gvidlibroj por instruistoj. Ĝin eldonis Unio Planeda kaj Brazila Esperanto-Ligo.

www.lernejojklasoj.net. Multe kontribuis por tiu elekto la teknikaj kaj didaktikaj ecoj de de la lernopakaĵo, taŭga por unulingva grupa lernado, kaj la favoraj recenzoj de Katalin Kováts, Stefan MacGill kaj Gražina Opulskiene, publikigitaj respective en la revuo Esperanto (Decembro 2010), en la poreduka portalo Edukado.net, en la Internacia Pedagogia Revuo kaj en la revuo La Ondo de Esperanto.





Post longa malsano, forpasis nia samideano ELÉUS LEONARDO DE SÁ, la 1-an de aprilo 2011, en Salvador, Bahia, Brazilo. Li naskiĝis en la 17-a de junio 1924 kaj alfabetiĝis en la aĝo de dek du jaroj. Eléus estis memlernanto kaj eniris en fakultaton, kies juran kaj beletran kursojn li ne sukcesis kompletigi.

Kiam forpasis, Eléus loĝis en Abrigo Salvador (azilo por maljunuloj), kie li pasigis la lastajn jarojn de sia vivo. Josenilton Passos do Nascimento, samideano el Salvador, interparolis kun funkciulino de tiu institucio kaj ŝi entuziasme informis,

ke Eléus estis tre fervora esperantisto en la Abrigo Salvador, ke li instruadis Esperanton al multaj gekunuloj kaj ke li estis tre simpatia kaj klera homo.

Eléus aktivis senlace por Esperanto en la suda parto de Bahia (Ilhéus, Itabuna kaj Maraú). Laŭ informo troviĝanta en "Historio pri la Esperanta Movado en Brazilo", verko kunordigita de Osvaldo Pires de Holanda, *"Eléus Leonardo de Sá dum pli ol kvardek ses jaroj sin dediĉas sen malkuraĝo al la disvastigado de Esperanto ne nur per la instruado de la lingvo, sed ankaŭ pere de aperigo de artikoloj en brazilaj ĵurnaloj kaj ankaŭ eksterlande"*.

Eléus fondis la organizaĵon Ilhéus Esperanto-Grupo kaj helpis la fondon de Itabuna Esperanto-Asocio. Li prezidis Ilhéus Esperanto-Grupo dum pluraj oficperiodoj.

Li partoprenis kvin universalajn kongresojn kaj plurajn naciajn kongresojn de Esperanto.

Ni ŝuldas al Eléus la starigon de la busto de Zamenhof en Ilhéus, ĉe la Municipa Sekretariejo pri Edukado kaj Kulturo. Tiu busto estis inaŭgurita en julio 1985. Valoras mencii, ke ankaŭ oni donis la nomon Esperanto al strato en Ilhéus (1981), danke al la klopodoj de Eléus.


Eléus rakontis al revuo Kooperativismo (outubro, novembro 1959) pri sia unua konatiĝo kun Esperanto kaj pri sia esperantistiĝo, en la jaro 1949. Li diris, ke legis pri la afero en "Reformador", oficiala organo de Brazila Spiritisma Federacio. Poste li lernis la lingvon pere de la libro "Esperanto sem mestre" (Esperanto sen instruisto), de Francisco Waldomiro Lorenz, eldonita de Brazila Spiritisma Federacio.

Laŭ la gazeto Esperanto Notícias (januaro, februaro, marto 1974), Eléus loĝis kelkan tempon en la satelita urbo Taguatinga, en Federacia Distrikto.

Li estis delegito de Universala Esperanto-Asocio em Ilhéus kaj faka delegito pri malklerado, nemoveblaĵoj, framasonismo kaj tria-aĝuloj.

De Josenilton Passos do Nascimento, en interreto, la 27-an de aŭgusto 2011 : "Eléus estis treege afabla kaj bonhumora movadano, ĉiam kun entuziasma kaj pozitiva sinteno. Li estis vera flagportanto de nia verda afero."

Libroservo de Brazila Esperanto-Ligo




Esperanto por lernejoj klasoj 1.
Josias Barboza. Brasília: UP-BEL. 2008. 164 pg. 28cm. Paroliga metodo kun ekzercaro kaj kd-sono, tute en Esperanto. Nivelo A1-A2-B1 laŭ Komuna Eŭropa Referenckadro. Libro de la lernanto aŭ libro de la instruisto kostas la samo, unuope, R\$50,00 + sendokosto.



Esperanto Baza Kurso.
M.A.F.Teixeira. Florianópolis: UFSC. 2005. 390 pg. 23 cm. 7 lecionoj kun la 16 fundamentaj reguloj, gramatiko, kaj diversaj kaj gravaj tekstoj por praktiki la legadon. R\$45,00 + sendokosto.


Esperanto por lernejoj klasoj 2.
Josias Barboza. Brasília: UP-BEL. 2010. 178 pg. 28cm. La dua volumo de la paroliga metodo kun ekzercaro kaj kd-sono, tute en Esperanto. Nivelo B1-B2 laŭ Komuna Eŭropa Referenckadro. Libro de la lernanto aŭ libro de la instruisto kostas la samo, unuope, R\$50,00 + sendokosto.



Vojaĝo en Esperanto-lando.
B.Kolker. Rotterdam: UEA. 2005. 280 pg. 24 cm. Perfekta kurso de Esperanto kaj Gvidlibro pri la Esperanto kulturo. R\$59,00 + sendokosto



Ilustrita Metodo de Esperanto.
Y.L.Seguin. Belo Horizonte: EEE. 1977. 123 pg. 28 cm. Tute ilustrita, ĉi tiu kurso estas bazita sur la laboro de Dr. William S. Benson kaj inkludas Ekzercaro de Zamenhof. R\$30,00 + sendokosto.



Esperanto para principiantes. A.Sartorato. Brasília: BEL. 2008. 130 pg. 22 cm. 16 lecionoj kun propra vortaro. Nur la libro R\$25,00 + sendokosto. KD-Sono kun lecionoj kaj dialogoj vendata malkune. R\$10,00.

Esperanto em método ilustrado.
S.Marcek. Slovakio: autoro. 2007. 114 pg. 25 cm. Kurso kun 22 lecionoj, ilustrita, kun vortaro kaj gramatiko en portugala lingvo. R\$30,00 + sendokosto.



Esperanto de nivelo al nivelo.
Korody Z., Kovacs M., Salomone C.P., Dr. Szabo L. Budapest: ELTE-ITK. 2008. 136 pg. 24 cm. Lingva ekzameno origo. Tiu ĉi libro celas helpi la prepariĝon je la ekzameno en niveloj B1, B2 kaj C1. R\$42,00 + sendokosto.



47-a Brazila Kongreso de **Esperanto**

47º Congresso Brasileiro de Esperanto

**Dato: de la 15-a ĝis 19-a de Januaro 2012
Taguatinga (Brasília/DF)**

**Temo: Renoviĝo de Esperanto-Movado:
Komunikado, Diskonigado kaj Edukado**

**Tema: Renovação do Movimento Esperantista:
Comunicação, Divulgação e Educação**



www.taguatek.org.br



Taguatinga Esperanto-Klubo



Esperanto-Asocio de Brasilia



Brazila Esperanto-Ligo